
LA idealisto kiu neniam rezignis
ARCH KLUMPH
kaj sia REVO de la
ROTARY FOUNDATION
Story by
JOSH ELDER
Illustrations by
STEVE BUCCELLATO
with DONALD HUDSON
Lettering by JOHN ROSHELL of COMICRAFT
NOVEMBER 2016 | THE ROTARIAN 29


ROTARY WORLD HEADQUARTERS
EVANSTON, ILLINOIS
Antaŭ 100 jaroj, la Rotary Foundation (Rotaria Fondaĵo) iĝis potenca forto por humanaj helpoj en la mondo.
Komence kreita pere de individuaj donacoj - pli ol 3 bilionoj da dolaroj nune - la Rotary Foundation donacis centojn da stipendioj por valoraj humanaj projektoj en la mondo...
ROTARY CLUB
DONATIONS
FOUNDATION GLOBAL GRANTS 2014-15
por la jaro
LUKTO KONTRAŬ MALSANO
329 stipendioj sume $19,8 milionoj
PROVIZI PURAN AKVON
302 stipendioj sume $20 milionoj
PROMOCII PACON
68 stipendioj sume $4 milionoj
33 stipendioj sume $8 milionojn
EDUKA HELPO
78 stipendioj sume $5,7
PROTEKTI PATRINOJN KAJ INFANOJN
ELRADIKIĜO DE POLIO
$123,4 milionoj
168 stipendioj sume $11,2 milionoj
GRANDIGI LOKAJN EKONOMIOJN
... sed ĉio komenciĝis kiel revo de rotariano el Cleveland, kiu nomiĝis Arch C. Klumph.


Memfarita magnato pri lignotrabaĵo, Klumph iĝis fondinta membro de la rotaria klubo de Cleveland en 1911.
Sociale motivita Klumph sin dediĉis tute al organizo kaj ĝia valoro. Li priskribis sin kiel homo,kiu "pensas Rotary, dormas Rotary kaj sonĝas Rotary," kaj li ŝatis sonĝi malavare.
Liaj kunrotarianoj distingis lian dediĉon kaj elektis lin prezidanto de la Internacia Asocio de Rotary en 1916.
ROTARY CONVENTION
ATLANTA
18 JUNE 1917
Kiel prezidanto, Klumph uzis sian ĉiopovan influon por trudi sian humanan vidmanieron al estonteco de R.I..
2


Daŭrigante diversaspektan **humanan servon**, kiel ni nun faras...
... ŝajnas esti altgrade tuttaŭga fari **monprovizon** por **bone efiki en la mondo**.
CLAP
HEAR HEAR!
CLAP CLAP CLAP CLAP CLAP
La parolado bone trafis ĉiujn ĉeestintojn. Nature, Arch Klumph ne estis la unua rotariano, kiu promociis la idealon de Servo Super Mio (*)
* Service Above Self


Fakte, la rotaria devizo "Tiu Profitas Pleje, Kiu Servas Plej Bone" originas el parolado de rotariano Arthur Frederick Sheldon (Chicago) dum la unua Rotary Convention* en 1910.
Rotarianoj realigas tiun idealon pere de kompatemaj aktivaĵoj kiel organizi helpon post la granda inundo de 1913, kiu detruis urbojn tra Midwestern United States (Uzona Mez-Okcidento)...
* Jara kunveno de ĉiuj kluboj en la mondo (kiel U.K. en Esperantujo).
... kaj dank'al higiena plibonigo pro konstruado de la unuaj necesejoj en Chicago..
MEN
MEN
Finfine, Klumph estis la unua, kiu pledis favore al kreado de daŭra helpema monprovizo, tiamaniere por sekurigi la servon, kiun la granda rado aktivigas.


La monprovizo havis bonan ekon kiam, nelonge post la parolado de Klumph, la rotaria klubo de Kansas City donacis la unuan monsumon de $26,50.
FOUNDATION
AMT
26.50
DATE
1917
DONATIONS
Kaj poste ... **nenio**. Krom kelkaj malgrandaj kontribuaĵoj, la monprovizo efektive dormis dekajn jarojn.
ROTARY FOUNDATION
AMT
BALANCE
26.50
26.50
DATE
1917
DONATIONS
En la jaro 1928 la Rotary Foundation establiĝis formale kiel disa laŭleĝa unuo en la Rotary International.
Jam nun, Klumph devis transloki la fondaĵajn dosierojn el sia oficejo de Cleveland, pro manko da spaco, en la ĉefkvartirojn de Rotary International en Chicago.
ROTARY FOUNDATION
ROTARY FOUNDATION
Klumph neniam malfortiĝis pri sia dediĉo al la Fondaĵo, sed la videbla seninteresiĝo de la rotarianoj damaĝis lian idealon.
Mi ekstreme bedaŭras ke iu rotariano estis tiel **malafabla** kaj **maljusta** kaj **mensoga** por aserti ke ...
... "La Fondaĵo estis sovaĝa revo de Arch Klumph." *
* el parolado de la jaro 1934


Nova vento (:-)) venis la 27-an de januaro, kiam Paul Harris, la fondinto de Rotary kaj kara amiko de Klumph, mortis post longa malsano.
AS IT MUST to all men, death came to Paul P. Harris, Founder and President Emeritus of Rotary International, on January 27, 1947, in his home in Chicago. Though he had been ill in recent months, his passing came nevertheless as a sudde shock to the Rotary world. Two days befo Rotary's international Board had adjour a week's meeting in Chicago and all but few Directors were en route home. Thos who could, joined with President Richar Hedke. Past Presidents Arch C. Klumph George C. Hager, and T.A. Warren, and hundreds of Rotarians and friends of t
Antaŭ morti, **Harris** estis klariginta ke neniu montriĝema monumento estu starigota memore al li. Li eĉ ne deziris ke oni sendu florojn por lia funebraĵo.
Li asertis, ke se ili **sincere** deziras honori lian memoron, ili donacu monon al R.F..
Julie 1948, la Paul Harris memoriga kapitalo atingis $1,3 milionojn de rotarianoj ĉirkaŭ la mondo - pli ol $13 aktualaj milionoj.
El tragedio naskiĝis triumfo.


Klumph, kiu aĝis 82 jarojn, mortis je la 3-a de junio 1951.
ROTARY FOUNDATION
DATE
BALANCE
700,000
1946 DONATIONS 2,016,305
1948 DONATIONS 2,334,324
1949 DONATIONS 2,506,500
1950 DONATIONS 2,771,866
1951 DONATIONS
Li estis aktiva konsilanto de la R.F. ĝis siaj 70-aj jaroj kaj dum sia vivo li povis konstati ke sia "**sovaĝa sonĝo**" finfine iĝis realo.
THE ROTARY FOUNDATION
Arch C. Klumph postlasis al la estontaj rotariaj generacioj fortegan levilon, kiun ili uzus por movi la mondon.
ARCH C. KLUMPH


Post la dua mondmilito, la R.F. sendis helpon al delogikitaj rotarianoj kaj al iliaj familioj, sed tio estis nur kuraci la simptomojn de milito.
BLANKETS
Por promocii ĝentilecon inter la venontaj generacioj de mondaj estroj, la R.F. lanĉis sian **unuan programon**, Amikaroj por Progresemaj Studoj, pli malfrue konitaj kiel Ambasadaj Stipendioj*.
* Ambassadorial Scholarships
FAMAJ EKSSTUDENTOJ
Ekde 1947 ĝis 2013 la R.F. financis pli ol 41.000 studentojn el pli ol 130 regionoj por servi kiel bonvolaj ambasadoroj alilande. La R.F. daŭrigas tiujn stipendiojn pere de "global" kaj "district grants"*.
* Stipendioj financitaj helpe de R.I. kaj distriktoj kiam kluboj prezentas iun valoran projekton.
PAUL VOLCKER
U.S., 1951
CHAIR OF THE U.S. FEDERAL RESERVE
SADAKO OGATA
JAPAN, 1951
UN HIGH COMMISSIONER FOR REFUGEES
CARLOS ALBERTO DA MOTA PINTO
PORTUGAL, 1958
PRIME MINISTER OF PORTUGAL
ROGER EBERT
U.S., 1964
PULITZER PRIZE-WINNING FILM CRITIC
En la jaro 2002, la unua klaso de Rotariaj Stipendiuloj por la Paco* komencis ĝian studon. Nune ekzistas ses Rotariaj Centroj por la Paco** ĉe famaj universitatoj en la mondo.
* Rotary Peace Fellows
** Rotary Peace Centers
La Centroj por la Paco trejnis pli ol 1000 stipendiulojn por antaŭeviti kaj solvi konfliktojn, preparante ilin por ludi estran rolon en registaroj, ne registritaj organizoj, leĝproponantaj organizoj, kaj tiel plu.




En la jaro 1980, R.I. bondeziris elradikigi la poliomjelitan viruson pere de monda vakcinado.

*Por pli da informoj konsultu Vikipedion
** World Health Organisation
*** United Nations of International Children's Emergency Fund
**** Child Development Center

La PolioPlus programo estis lanĉita en la jaro 1985, kay R.I. ekkomenciĝis labori kun organizoj kiel WHO**, UNICEF***, CDC**** kaj la Bill & Melinda Gates Fonduso por strebado elradiki.




Laŭgrade la R.F. kaj siaj partneroj alproksimiĝis al la definitiva elradikigo de poliomjelito.


Matching Grants (1965), 3-H Grants (1978) kaj ĝiaj postirantoj, Global kaj District Grants (2013) estis la unuaj metodoj de la R.F. por distribui subvenciojn por valoraj projektoj.
PROMOCII PACON
LUKTI KONTRAŬ MALSANOJ
DISTRIBUI PURAN AKVON
SAVI PATRINOJN KAJ INFANOJN
Subvencioj ... jen por favori la disvolviĝon de la "Concentrated language Encounter"* metodo kontraŭ la senalfabetigo en Tajlando ... jen por garantii kvalitan kuracadon metodon al patrinoj kaj infanoj en Niĝerio. * Speciala metodo por alfabetigi.
1 one
2 two
5 five
APOGI EDUKADON
Do subvencioj rajtigis rotarianojn cirkaŭ la mondo plibonigi nekalkuleblajn vivojn.
PLIFORTIGI LOKAJN EKONOMIOJN
10


La historio de la R.F. komenciĝis kun Arch Klumph, sed dum la lastaj 100 jaroj, ĝi disvastiĝis kaj permesis distribui miliardojn da dolaroj cirkaŭ la mondo.
Tio estas la historio de ĉiu rotariano, kiu donacis tempon, monon, kaj sperton al iu ajn projekto de la R.F.
Rotary
1560
ONE ROTARY CENTER
1560
Tio estas la historio de ĉiuj homoj, kies vivoj pliboniĝis dank'al tiuj projektoj.
Tio estas la historio de bonfarado en la mondo, kaj tiu historio ĵus komenciĝis.
LEGU PLU PRI LA ROTARIA FONDAĴO KAJ KIAMANIERE VI POVAS FESTI ĜIAN CENTJARIĜON ==> WWW.ROTARY.ORG/FOUNDATION100
DONACU AL LA ROTARY FOUNDATION ==> WWW.ROTARY.ORG/GIVE
Specialan dankon al David C. FORWARD, aŭtoro de "Doing good in the world": THE INSPIRING STORY OF THE ROTARY FOUNDATION'S FIRST 100 YEARS.
11